B.K. 1974 tria premio
Kuroda Masayuki -. Japanio

Supren penetris frost'

Glacia vent trablovis vangojn tranĉe,
kirlante mortfoliojn sur la strat',
taksioj preterkuris konsonance,
bruegis kamionoj sen kompat'.
Venis neniu bus' ĉe l' haltejfost'.
Penetris supren de du plandoj frost'.
    Nudpintaj platanbranĉoj staris treme,
    enpikis en ĉielon de bluet',
    postsunsbiraj nuboj brumis splene,
    transfluis jet' en ŝarka siluet',
    dronis tenebren jam ruĝkest' de poŝt'.
    Penetris supren tra genuoj frost'.
Provoke ĉe l'amaso bus-embuska
taksion stopis junoficistin'.
Reflekse povris mia viv' krepuska,
momente ridis sarkasma destin'.
Daŭris penteblaj jaroj jam depost
milit'. En kor' trafulmis mensa frost'.
    Juntage mi ja laboradis sklave,
    timante senlaboron pro panik'.
    Junulojn nun dorlotas tiel grave
    kiel la oran ovon sen kritik'!
    Ĉu laŭ destin' ĉenite de l' karma vost'
    mi devis, devos vivi plu en frost'?!
Jam nokt' vualis, frida vent' inferis,
rektsupre jet' tondriris, fi-gangren',
blindigis reflektoroj; ne aperis
aĥ buso, … ĉu tro stagnis pro homplen'?
Spite de rezignaciem' ĝis ost'
jam pelis min ekpaŝi korpa frost'.
    Laŭlonge de senĉesa aŭta fluo
    sur trotuar' kuretis kontraŭ vent'
    por gajni varmon kun dilema skuo,
    ĉu buso preterkuros en moment'.
    Vivo verŝajnas veto kun ripost'!
    Nur fuĝo prompta for de l' nuna frost'.

Reutao

Surstrate pikis
min vespervent' frosttrema,
elteno vekis
defian forton eĉ en mi
denaske rezignema.
    La adoleska
    aspiro jam senspuris,

en viv’ krepuska
ankoraŭ mi vegetas,
destina frost’ min torturis.

Jam publikgiita en 25 jaroj, Antologio de Belartaj Konkursoj, HEA 1979.